

Gonçalo Neves

REVENO AL LISBONO

**Persona (kaj eĉ iom kulisa...) raporto,
sufiĉe detala, pri la 103a Universala
Kongreso de Esperanto**



Eldonejo Drako

2019

Gonçalo Neves

REVENO AL LISBONO

**Persona (kaj eĉ iom kulisa...) raporto,
sufiĉe detala, pri la 103a Universala
Kongreso de Esperanto**

Eldonejo Drako



Espinho, Portugalio

majo 2019

Reveno al Lisbono

Majo 2019

Espinho, Portugalio

Todos os direitos reservados / Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Verko originale verkita en Esperanto

© Eldonejo Drako — Gonçalo Neves

eldonejo.drako@gmail.com

Bildo sur la kovrilo: Panoramo pri Alfamo, historia kvartalo en
Lisbono.

Bildo sur dorsa kovrilo: La libroservo de la 103a UK.

Enhavo


Enkonduka klarigo	4
1. Averta.....	7
2. Ekiro kaj vojaĝo	7
3. La Movada Foiro.....	11
4. Serio Oriento-Okcidento	18
5. La Solena Inaŭguro	30
6. Iberumado	33
7. La Belartaj Konkursoj.....	36
8. La aŭkcio.....	39
9. La Esperantologia Konferenco.....	41
10. La surpriza festlibro... ..	43
11. Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj... ..	45
12. Finaj mikspotaj rimarkoj.....	49
Indekso de personoj	52
Bibliografio	54

Enkonduka klarigo

La nun eldonitan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun gapaj okuloj. “Kial diable nur nun aperas raporto pri kongreso, kiu okazis antaŭ tiom da tempo?”, vi eble — kaj prave! — demandos. Nu, por tion klarigi, mi devas skizi la historion de la verko...

Tuj post mia partopreno en la 103a Universala Kongreso de Esperanto, mi verkis personan kaj privatan raporton sufiĉe detalan, kiun mi sendis al tre eta grupo da fidelaj amikoj.

Nur tion mi celis: ke la persona raporto restu ankaŭ privata. Tamen poste iu defiis min — mi ne scias, ĉu scivole, ĉu malice —, ke mi provu traduki ĝin — imagu! — en Idon. Kial tiu persono tiel defiis min? Pro la ekstrema kalembureco de la originalo, mi supozas... Eble tiu volis elprovi min — aŭ la iam rivalan lingvon —, same kiel en la lulila epoko de Esperanto iu defiis la Majstron traduki *The Battle of Life* (1846) de Charles Dickens (1812–1870), kvazaŭ tiu pensus, “Nu, se vi sukcesus traduki



Unu el la multaj eldonoj (2016) de *La batalo de l' vivo*, kiun Zamenhof tradukis en 1891 (el germana versio) pro defio.

tion, eble la lingvo meritus ian konsideron”...

Nu, “kial ne?”, mi pensis. Mi ja ŝatas defiojn. “Eble mi eĉ povus ĝin publikigi en Ido, preterlasinte iujn detalojn tro privatajn”, mi plue pensis, “ĉar, se paroli sincere, Ido nun rolas nur kiel *ekzota* lingvo, kaj eble tial la verko vekus iom da atento...”. Per publikigo, krome, la ĝenerala publiko povus ekscii eventuale interesajn detalojn kongresajn, kiuj ordinare ne aperas en raportoj oficialaj, duonoficialaj aŭ oficialecaj...

Longe mi kovis tiun ideon, kaj plurfoje mi komencis la taskon, sed mi ĉiam rezignis post kelka tempo. Unuflanke, ŝajnis al mi, ke multaj detaloj estas tro esperantecaj kaj probable ne interesos profanojn; aliflanke, mi sentis, ke iuj esprimoj apenaŭ tradukeblas kaj ke la originala stilo, plena de kalemburoj kaj internaj rimoj en prozaj frazoj, ŝajnas apenaŭ imitebla aŭ reproduktebla en Ido, lingvo ja ordinare iom pli precioza kaj altbrova, dotita per alia ritmo kaj malsama kadenco.

Tamen, kiel tradukisto, mi scias ankaŭ, ke nenio estas absolute netradukebla. Tial mi persistis kaj insistis kaj, malgraŭ multaj interrompoj kaj hezitoj, mi sukcesis, post longa tempo, bone aŭ malbone, fini la taskon.

Ege surprizis min la nombro da homoj, kiuj elŝutis la verkon el la koncerna retejo, malgraŭ la naneco de la nuna Ido-movado. Tial, malgraŭ la tempopaso, mi konkludis, ke estus senseca, se la raporto ne aperus ankaŭ en sia originala lingvo.

Eble ĝi vekos kelkan intereson, ĉefe pro la burleskaĵoj, kiujn ĝi prezentas. Ĝi tamen celas ne moki, sed nur prezenti la pure homan flankon de ni ĉiuj, ĉu moŝtaj, ĉu ordinaraj.

Jen do la verko. Ĝi ne ŝimu en ies tirkesto. Nun ĝi plu estas persona, sed ne plu privata. Fine mi danku mian amikon Jorge Camacho, kiu skrupule provlegis la lastan version de la manuskripto kaj helpis min elsarki misojn ĝise ne rimarkitajn.



Lisbona Jura Fakultato, la ĉefa eventejo de la 103a UK.

1. Averta

La nuna plumknaraĵo ne klasifikeblas kiel raporto (pompa nomo!), kaj ĝi eĉ ne rangas artikole. Ĝi ja konsistas el nuraj disaj impresoj, aŭ svagaj dagerotipoj, pri mia spertaro dum la 103a Universala Kongreso de Esperanto (precioza titolo!), kiu havis lokon de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2018 en la eksa imperia urbo Lisbono, kiun niaj verdaj pioniroj nomis Lisabono.¹

2. Ekiro kaj vojaĝo

Mi startis sabaton, la 28an de julio, frumatene, el la stacidomo de Espinjo (*Espinho* en la luzida idiomo), eta marborda urbo norda, kie mi ekloĝis antaŭ ĉirkaŭ unu jaro kun mia familio. Mi altrenis du rulvalizojn, peze remburitajn: en unu sidis vestoj nur someraj kaj la kutimaj nepraĵoj tualetaj kaj galanteriaj, en la alia kaŭris nur stakoj da ekzempleroj el la libra triopo iel akuŝita de la nuna plumknaristo en 2018 — *La senditoj, Periskope, Recenze* —, per kiuj mi intencis bagatele

¹ La formo *Lisabono* (1890), nun arkaika, estas pli frua ol *Lisbono* (vd. Neves/Pabst 2018: 308).

regali fidelulojn kaj ŝakre provizi la elroterdaman libroservon ionelan.

La duvalizan *ĉombon*² mi altrenis sur malglata trotuaro, lante kaj pene trairante la duonklaftan distancon inter loĝejo kaj stacidomo: ho, la fifama *calçada portuguesa* (“portugala pavimo”), sublime okulplaĉa, sed samgrade



Tipa pavimo portugala: ja tre bela, sed ankaŭ nekomforta...

piedatenca, kies neregulajn kvadrajn³ pavimerojn — nomatajn *paralelos* en la ĵargono ĉi-urba — prave abomenas ĉiaj rulseĝuloj, biciklantoj, rulkorbaj dommastrinoj, infanĉaretaj puŝantoj, lambastonaj olduloj kaj... rulvalizaj trenantoj! Kiam oni povos tamen ĝui ĉi-lande trotuarojn el glataj slaboj?

Post dudekminuta skuiĝo surstrata mi fine enrampis la stacidomon, kaj dum tujposta atendo trajna mi elŝovis notkajereton el taliosako, por enskribi la unuan registrindaĵon. Ĉu banalaĵon? Eble ne tiom. Mezaĝa viro, modeste vestita, en

² **ĉombo** (svahila *chombo*): okaza literatura vorto signifanta “la tuta vazaro, ilaro, meblaro aŭ bagaĝo de iu persono, familio aŭ alia grupo”, ĉi tie uzata iom ŝerce. Vorto enkondukita de Sekelĵ (1983: 9) kaj pluuzita de Camacho (1997c: 118, 2016a: 65) kaj Declerck (2002: 28).

³ **kvadro**: orta paralelepipedo (NPIV, 2002).

sandaloj, laŭiris la kajon — kiun niaj pioniroj, laŭ instinkta bonlingvismo *avant la lettre*,⁴ nomis “bordmarŝejo”⁵... — kaj per poŝlampo inspektis la senŝpalan trakon. Kion li? Mi ne tuj komprenis, nur post pripenso. Li ja serĉis monerojn sur la ŝotro! Jen do plia mizerulo ĉi-urba, kiu hontas almozpeti sur la abomenaj kvadraj pavimeroj kaj tiel havigis al si strangan rimedon por iomete farĉi la stomakon. El fenestro de mia apartamento duaetaĝa mi antaŭnelonge hazarde ekvidis viron, ankaŭ mezaĝan, kiu rondiris sur korto vidalvida kaj ofte kliniĝis, etendante brakon suben. Nu, enfokusinte miajn vidglobojn, mi rimarkis, ke li kolektas kaj enpoŝigas panpecojn, kiujn najbara oldulino el la unua etaĝo de flanka loĝturo ĉiutage ŝutas straten, por nutri la kolombojn de nia kvartalo...

La veturo iris sate kaj glate... kaj akurate. Jen moderna trajno komforta, pura, klimatizita, provizita per senpaga reta konekto. Krome, ĉiu sidilo disponas elektran



La trajno Alfa Pendular, kiu interligas i.a. Lisbonon kaj Oporton.

⁴ *avant-la-lettre* (laŭvorte, “antaŭ la litero”): francaĵo, signifanta “antaŭ ol oni kreis la koncernan vorton”.

⁵ Tiun ĉi vorton ekuzis la rusa oficiro Fjodor Postnikov (1872–1952) en 1900, kaj lin imitis la franca komercisto René Lemaire (1876–1954) samjare (vd. Neves 2018a: 57).

kontaktojn. Mi do povis trankvile komputi dum la tuta vojaĝo kaj iom pretigi la *Power-Point*-aĵon de mia prelego pri la Historia Vortaro, prezentota dum la Esperantologia Konferenco...

En Lisbono mi engastiĝis ĉe miaj gepatroj, kiuj jam atingis tre respektindan aĝon. Mia patro, nun 86-jara, lamas sed tute (eĉ brile) lucidas, dum mia patrino, nun 82-jara, vigle paŝas sed forgesemas, pro iama apopleksio. Okaze de la lisbona UK mi do revenis *ad fontes*:⁶ al la urbo, kie mi seninterrompe loĝis inter mia 6a kaj 27a jaraĝoj kaj ankaŭ poste dufoje; al la domo, kie mi i.a. eklernis Esperanton unuafoje en 1983 kaj, post prakabeo, denove kaj samlibre en 1987;⁷ kaj eĉ al la lito, kie mi unuafoje poluciis...

Tamen Lisbonon trafis multaj ŝanĝoj dum la lastaj jaroj, kiujn surprize rimarkas malofta vizitanto. Multajn tradiciajn butikojn anstataŭis internaciaj ĉenoj, biciklaj vojoj serpentumas preskaŭ ĉie, oftas parkejoj kaj prenejoj de elektraj bicikloj



Lisbona tuktuko, kun farbumo imitanta tipajn azuleĥojn.

⁶ *ad fontes*: latinaĵo signifanta “al la fontoj”.

⁷ vd. Neves 2018b: 2.

lueblaj, plilarĝiĝis trotuaroj (kvankam ili preskaŭ ĉiam plu konsistas el la fifamaj pavimeroj!), eĉ tuktukoj⁸ ne mankas. Entute, ĝi fariĝis urbo pli turisma, pli kosmopolita, sekve malpli varia oferte kaj pli kosta, kaj ankaŭ malpli aŭtenta. Feliĉe ĝi plu odoras unike, dolĉe, kiel antaŭe, malgraŭ ĉiama poluo ĉiaspeca.

3. La Movada Foiro...

Tamen mi celis kongresumi, ĉu ne? Nu, la UK ekis ĝuste tiuvespere, per t.n. Movada Foiro, kiun mi vizitis unuafoje. En miaj antaŭaj UKoj (Varsovio, 1987; Valencio, 1993; Berlino, 1999) mi ja tian aranĝon ial maltrafis, se ĝi entute jam ekzistis. Tre interesa iniciato, kiun tamen tute fiaskigis la malvasteco de la loko elektita. Laŭ provizora listo anoncita, temus pri 110 tabloj, ĉe kiuj devus deĵori responsuloj de ĉiaj imageblaj asocioj, societoj, kluboj, rondoj kaj eldonejoj, en tre kurioza aranĝo: ekzemple, laŭ la plano, Ateista Tumonda Esperanto-Organizo najbarus al Amikaro Bruno Gröning kaj al Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz, sed ankaŭ al Tutmonda Asocio de Esperantistoj Nefumantoj kaj al Ligo Internacia de Blindaj

⁸ **tuktuko**: trirada motorveturilo, tradicia en multaj aziaj landoj, nun uzata ankaŭ por transporti turistojn en pluraj eŭropaj urboj (AFI *tuk-tuk*, G *Autorikscha*, *Tuk-tuk*, Po *autoriksz*a, R *тук-тук*).

Esperantistoj... Tamen la foirejo tiel malvastis, ke ne eblis disponigi po unu tablon al ĉiu kolektivo, kaj do devis samtable ekspozicii kaj varbostrebi tri aŭ kvar el ili, eĉ se kontraŭcelaj, tute mikse kaj ŝoke, kaj flugfolioj pri reenkarriĝo kuntuŝe apudis aŭ eĉ parte kovris aliajn, kiuj prezentis nerefuteblajn pruvojn pri neekzisto de Dio, aŭ inverse.

Krome, la tuta kongresanaro enstampedis disvoĉe. La bruaĉo kaj varmego fariĝis neelteneblaj. Ĉian klarigon de ŝvitaj deĵorantoj ĉetablaj supersonis laŭtiĝanta murmur' homamasa. Plie, la vizitantoj, sardele kaj pelmele, apenaŭ povis krabli de

tabl' al tablo, malgraŭ dispuŝoj, kubutumoj kaj trabatoj. Nur ŝatantoj de kuntuŝoj, kaŝpalpoj kaj fingrumoj (krom poŝoŝtelistoj) bone fartas en tiaj brutejoj. En la sekva tago, la 2a numero de *Taĵo Nia*, la kongresa kuriero,⁹ enpresis prian versaĵon de kongresano 615 (temas pri Russ Williams, el Pollando, kies retadreso, laŭ la kongreslibro, iom makabre tekstas *cxiomortas...*):



La unua numero de *Taĵo Nia*, la kongresa kuriero de la 103a UK.

⁹ https://uea.org/pdf/uk2018/UKKuriero_2.pdf

“Movada foiro interne?
Tro dense, humide, kaverne!
Ekstere sur placo
sen ajna agaco
pli plaĉus, neniel konsterne.”

La supra elplumaĵo certe plaĉus al Grigori Arosev — kiu ĝin recenze titolus “Poezia poemio” —, ĉar ĝin ornamas enordaj rimoj kaj galopigas ritmo tinta kaj orelplaĉa kaj, precipe, ĉar ĝi liveras nemiskompreneblan sencon.¹⁰ Do eblas facile konkludi, ke ĝin verkis iu alia, ol modernisma diletanto sen scio ĉi-metia...

Se paroli pri *Taĵo Nia*, pluraj kongresanoj demandis min pri la signifo de tiu mistera titolo, kaj ĝuste tion mi celis, kiam mi antaŭkongrese ĝin proponis al LKK...¹¹ Krome, laŭ posta

¹⁰ Laŭ Camacho (2016b: 66), Arosev “havas la honoron esti verkinta la plej malkompetentan recenzon” pri mia poemaro *Simptomoj* (1999), kiun li taksis “stranga” pro manko de rimoj kaj eĉ senco (laŭ lia cerbo) kaj ritmo (laŭ lia orelo). Tial li donis al sia ‘recenzo’ la bizaran titolon “Poezio sed ne poemioj”...

¹¹ La vortoformon *Taĵo* enkondukis en 1980 la brazila kemiisto kaj tradukisto Leopoldo Knoedt (1921–2000) en *La Luzidoj* — lia kompleta traduko de *Os Lusíadas*, majstroverko de la portugala poeto Luís de Camões (c. 1524–1580) —, por nomi la plej longan riveron de la iberia duoninsulo, nomatan *Tejo* ([ˈtɛʒu]) en la portugala kaj *Tajo* ([ˈtaxo]) en la hispana. Tiun ĉi vorton, kiu estas kvazaŭ meza aŭ kompromisa formo inter *Tejo* kaj *Tajo*, poste adoptis plej multaj iberiaj esperantistoj.

sciigo de Renato Corsetti dum kulisa triopa babilo kun mi kaj Carlo Minnaja — en kiu mi intence uzis fasketon da neologismoj por spiti la simpatian bonlingvanon... — iu kongresanino plendis al li pro jena titolo en la unua numero¹² de la kongresa kuriero: “Manĝu ĉipe, sed frue!”. Tia estas nia diligenta kolegaro...

Cetere, dum tiu triopa babilo mi ne povis ne kapti la okazon por denove piki Renato-n per neologisma banderilo. Temis pri tio, ke en antaŭa publika omaĝo al Marjorie Boulton (mardon, la 31an de julio), Humphrey Tonkin kaj Anna Löwenstein alterne deklamis kelkajn el la rondelaj *Rimletero*j, kiujn la brita poetino interŝanĝis kun William Auld en 1953–1954. Ili deklamis tre plaĉe — Löwenstein iom pli plaĉe ol Tonkin, eĉ brile, malgraŭ sia iom tro rimarkebla akĉento angla —, kaj mi aŭdis kun cinika plezuro la edzinon de Corsetti voĉlegi la 12an rondelon, verkitan de Boulton je 1953-10-20, kies fino de la unua strofo tekstas jene: “Mi volas vivi nek en *frido* / Nek en senbrida histerio”. Mi do moketis Renato-n tial, ke lia edzino devis perforti sin mem por elbuŝigi hidan neologismon antaŭ tiom da homoj — *hommage oblige*... —,¹³

¹² https://uea.org/pdf/uk2018/UKKuriero_1.pdf

¹³ *hommage oblige*: francaĵo signifanta “omaĝo devigas”. Temas pri parodio de la konata diraĵo *noblesse oblige* (“nobelego devigas”), per kiu oni aludas, ke, se iu apartenas al prestiĝa familio aŭ alta

sed mian provokon li kvitancis nur per nura rideto amara. Pro ĝentileco mi tamen ne demandis lin, ĉu lia edzino hipokritis aŭ nur forgesemis, kiam ŝi akceptis partopreni tian omaĝon al Boulton, ĉar en 2009, en la oktobra numero de *Esperanto*,¹⁴ ŝi publikigis artikolon sub la titolo “Poetoj detruas nian lingvon”, en kiu ŝi faras bonan lavon al niaj bardoj tro arogaj pro ties bastardoj neologaj. Kaj la tiama redaktoro de la ĉeforgano de UEA — institucio, kies ĉiujaraj Belartaj Konkursoj, kiel sciate, inkluzivas lingvodetruan branĉon... — eĉ permesis al si reprodukti sur la kovrilo la provokan titolon...

Unu el la ‘detruaj vortoj’, kiuj ŝajne plej malplaĉas al Löwenstein, estas — imagu! — *firmamento*, pri kiu ŝi jene disertis: “Strange, la argumento pri troa longeco ial forgesiĝas, kiam poeto nepre deziras uzi la vorton *firmamento* anstataŭ *ĉielo*. Estas vere, ke al parolanto de la angla aŭ la franca *firmamento* efektive havas iom poezian sonon, ĉefe ĉar oni renkontas ĝin nur en poeziaj kuntekstoĵ. Tial Esperantaj poetoĵ enportis ĝin en sian ‘poezian lingvon’. La vorto tamen ne troviĝas en neparencaĵ lingvoj: en la finna ekzemple, aŭ en la japana. Do, kion pensas finno aŭ japano legante tiun vorton?”

socia tavolo aŭ havas respektatan aŭ faman nomon, tiu devas konduĵi laŭe.

¹⁴ http://dvd.ikso.net/revuo/Revuo_Esperanto/2009/10.pdf (vd. ankaŭ la finan bibliografion).

Nu, mi ne scias, kion opinias finno aŭ japano pri tiu vorto, sed mi scias, ke en sia elĉinigo de 故鄉 (“Naskiĝloko”, 1921), konata novelo de Lusin (魯迅, Lǔ Xùn, 1881–1936), Elpin (t.e. An Useng, 1907–1991), fama korea Esperanto-verkisto, kiu “pasigis grandan parton de sia vivo en Ĉinio”,¹⁵ ne hezitis uzi ĝin dufoje, en jenaj bele ĉizitaj frazoj:

“La orflava luno pendas sur la profunde blua firmamento.”

(originale: 深蓝的天空中挂着一轮金黄的圆月,)¹⁶

“Supre, sur la profunde blua firmamento pendas orflava disko de plenluno.”¹⁷

(originale: 上面深蓝的天空中挂着一轮金黄的圆月。)

En ambaŭ okazoj Elpin uzis la vorton *firmamento* por traduki 天空 (*tiānkōng*), kaj li tion faris certe ne kaprice aŭ kun intenco lingvodetrua sed post medito kaj pro forta motivo. Laŭ Chen (秀珍), tajvana edzino de Jorge Camacho, 天空 signifas “fizika

¹⁵ Shi 2010: 503.

¹⁶ Originalo trovebla ĉe:

<https://zhidao.baidu.com/question/338046778>

¹⁷ Frazoj troveblaj en *Noveloj de Lusin*, 1974 (p. 72, 81), sen indiko pri tradukinto, kaj en *Ĉina antologio (1919–1949)*, 1982 (p. 22, 29), kun tia indiko. Tiu traduko de Elpin aperis unuafoje en 1963 (vd. Shi 2010: 503).

ĉielo”, kaj per ĝi eblas diri ekzemple *el cielo hoy está muy bonito* (“hodiaŭ belas la ĉielo”). Camacho mem “imagas ke Elpin uzis *firmamento* por ne pensigi pri spirita, figura, malinfera ĉielo”.¹⁸ Lia konjekto, laŭ mi, pravigeblas per analizo de la 34 trafoj de *firmamento* en la Tekstaro,¹⁹ el kiuj, cetere, nur kvar fontas el poemoj...

Pri *firmamento* Löwenstein argumentis ankaŭ, ke “Ĝia poezia kvalito ne estus klara al homo, kiu neniam renkontis ĝin antaŭe. Interese, ‘ĉiela volbo’, per kiu PIV difinas ĝin, al mi impresas multe pli poezie ol la neanalizebla vorto *firmamento*.” Kurioze, en tri el la prozaj ekzemploj en la Tekstaro legeblas “ĉiela firmamento”, esprimo ŝajne pleonasma, sed tute akceptebla kaj eĉ ne sena je apenaŭ klarigebla ĉarmo. Kaj kion diri pri la esprimo “la volbo de la firmamento”, renkontebla en *Sur la vojo*, bela mediuma poemo de Johano Maas?²⁰

Nu, en la ĉina, verdire, ekzistas pluraj vortoj por ‘ĉielo’. Ekzemple, en 起初, 神创造天地。 (Gen. 1:1) kaj 神称空气为天。 (Gen 1:8), ĉinigoj²¹ de du famaj bibliaj frazoj (“En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron”; “Kaj Dio nomis la firmaĵon Ĉielo”, respektive), aperas ne 天空

¹⁸ Ambaŭ informoj laŭ privata fejsbuka mesaĝo je 2019-05-01.

¹⁹ <https://tekstaro.com/>

²⁰ vd. Porto Carreiro Neto 1972: 67.

²¹ Ĉina versio ĉerpita ĉe: www.bibliaonline.com.br/tb+cuvs/gn/1

(*tiānkōng*) sed nur 天 (*tiān*), kaj kurioze, *firmaĵo* (kiu etimologie kaj semantike respondas al *firramento*) estas tradukita per 空气 (*kōngqì*), kies unua hancio²² (空, *kōng*) estas la sama kiel la dua de 天空 (*tiānkōng*). Plej verŝajne Elpin sentis, ke la komunuza ‘ĉielo’ ne sufiĉas por transdoni la tutan forton de 天空 (*tiānkōng*) kaj do helpis sin per *firramento*,²³ kiu cetere ekzistas en la lingvo jam de almenaŭ... 1905.²⁴

4. Serio Oriento-Okcidento

Nu, se reveni al la Movada Foiro, mi sukcesis, malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj de la ejo, alrampi la tablon de Japana Esperanto-Instituto, kaj tie mi demandis pri s-ro Syōzi Nobuyuki, kun kiu mi ekkorespondis en 2016, kiam li, pere de Jorge Camacho, donace sendis al mi la du solajn pvz-volumojn (ne plu haveblajn ĉe libroservoj), kiuj tiam mankis en mia kolekto: *de jeĥezkel al malaĥi* kaj *de josuo al jeremia* (temas

²² **hancio** (汉字, *hànzì*): ĉina skribsigno (vd. Camacho 2016a: 210).

²³ Verŝajne aplikeblas al Elpin (ĉinkultura koreo) la posta pritakso de Miyamoto (1979: 94): “inter orientaj esperantistoj la ĉinoj plej diligente studas kaj uzas ‘Plenan Vortaron’, kio lasas iliajn verkojn brilegaj; kaj samtempe foje tro banalaj, ĉar la vortotrezoro en ĝi ne ĉiam povas respondi al ĉia bezono de la orientanoj”. Tamen Miyamoto (1979: 124) opiniis ankaŭ, ke “Ĝenerale ĉinaj esperantistoj estas konservativaj en la lingvuzo”...

²⁴ vd. Ahlberg 1905: 32.

pri la bibliaj tradukoj de Zamenhof, kiuj siatempe aperis nek en *La Revuo* nek libroforme ĉe Hachette, do vera frandaĵo por esperantologoj kaj similaj ‘nerdoj’).²⁵ Tiam ankaŭ mi sendis al li, kompanse, koverton rembурitan per jenaj miaj elplumaĵoj: *Historia vortaro de Esperanto*, *La gardisto de gregoj*, specialaj numeroj 231 kaj 232 de *Fonto* (kiuj konsistas nur el verkoj el mia ateliero, originalaj kaj tradukaj). Poste nia korespondado interrompiĝis por du jaroj, sed dudek tagojn antaŭ la lisbona kongreso, trovinte mian nomon en la kongresana listo en la retejo de UEA, li reskribe sugestis, ke mi serĉu lin dum la foiro ĉe la menciita tablo.

Apud la tablo oni prezentis al mi lian afablan edzinon, s-rinon Syōzi Keiko, kiu sciigis min, ke mi estas invitita de ŝia edzo por grupa vespermanĝo en ekstera restoracio, kaj ke tiucele ni devas tuj alkuri taksion. Survoje, ankoraŭ en la foirejo, ni renkontis ŝian edzon, ankaŭ tre afablan, kaj ekster la ejo oni prezentis al mi pliajn gastojn, kaj ni ĉiuj piediris al stratangulo por haltigi taksion. Dum la piediro s-rino Syōzi konfesis al mi, ke nur antaŭ nelonge ŝia edzo rekomendis al ŝi eklegi miajn verkojn, pro troa neologismado. Min mirigis tia

²⁵ **nerdo** (A *nerd*): persono konsiderata negative stranga, ekzemple ĉar manka je socia talento, tede studema aŭ obsedita pri nekutima okupo aŭ hobio, kaj sume impresanta stulte, malloge aŭ ĝenule (difino laŭ Camacho 2016a: 109).

sciigo, ĉar dum nia korespondado s-ro Syôzi ne hezitis uzi vortojn kiel *mido* kaj *notora*, sed mi ĉion kvitancis per sincera rideto....

En restoracio Colina, sur strato Filipe Folque, jam konata de ges-roj Syôzi, tie lunĉintaj samtage, mi i.a. konatiĝis kun tre interesa paro (geedzoj Kitagawa), kaj s-ro Syôzi esprimis al mi sian ĝojon ĉe la konstato, ke mi parolas “tute normale”, ĉar antaŭ nia renkontiĝo li iom timis, ke mi uzos tro da neologismoj ankaŭ parole! Ankaŭ Kitagawa Hisasi tuŝis la temon, nome li demandis min, kun rideto sincera — do, ne moka —, ĉu mian manĝon mi trovas “bongusta” aŭ “delica”!

Mi sciiĝis i.a., ke japanaj geparoj preferas dormi en disaj litoj aŭ — se bonstataj — en apartaj ĉambroj aŭ eĉ — se nababaj — sur malsamaj etaĝoj. Tia saĝa aranĝo malpli oftas en ‘okcidento’, kie, laŭ mia scio, dislitajn geparojn oni ankoraŭ rigardas suspekteme, kvazaŭ io ne estus en ordo inter la paruloj! Ion tian mi spertis, kvankam neeksplicite, kiam mi kaj Catarina dislitiĝis post nia transloĝiĝo lastjara kaj akceptis la unuajn vizitantojn...

Nu, pri la vespermanĝo, temis entute pri tre interesa kaj amuza eksterkongresa ‘programero’, kaj ĉiuj geĵapanoj min impresis per sia sobra gajo, diskreta saĝo, parolemo (tamen ne babilaĉemo), klara prononco, bona lingvorego kaj konstanta malkrokodilemo, eĉ kiam ili klaĉis inter si. Entute, tre agrabla etoso, kiu bele kronis la unuan kongresan tagon!



En restoracio Colina. De maldekstre, laŭhorloĝe: Syōzi Keiko, Kitagawa Hisasi, Kitagawa Ikuko, Ulrich Lins, Povilas Jegorovas, Gotoo Itosi, Gonçalo Neves, Syōzi Nobuyuki.

London, la 30an de julio, laŭ antaŭkongresa interkonsento retmesaĝa, mi vespermanĝis kvarope kun ges-roj Syôzi kaj Ionel Oneț en restoracio Café Lisboa, en Largo de São Carlos, apartenanta al la restoracia ĉeno de José Avillez, portugala ĉefkuiristo, fama precipe pro sia restoracio Belcanto, situanta samkvartale, pro kiu li ricevis du Michelin-stelojn, kaj kie oni servas bonhavajn gastojn per eskvizitaĵoj (unu el kiuj, laŭdire, eĉ enhavas oron!). Ĝuste en tiela luksejo s-ro Syôzi deziris supei, sed necesas peti rezervon kun du- aŭ tri-monata anticipo, kaj li retmesaĝe komisiis al mi pritrakti la aferon nur tri semajnojn antaŭ la planita dato, do ne eblis la oazo, kaj ni devis kontentiĝi per malpli ŝika satigejo. Tamen la kvalito plaĉis, kaj ĉio iris glate kaj amuze, kvankam pri vinoj s-ro Syôzi postuleme palatis. Post ĉia gustumo de ruĝa nektaro renoma, li ja nin regalis per lakona komento senvaria, kronita de serafa rideto: “Akceptebla...”.

Ionel babilis, muelis, kion lango elpelis, krome pantagruelis, kaj la gorgon tralavis biere kaj vine, do lia parolo glitis de tem’ al temo per flugiloj de facila vento, kaj ne mankis klaĉoj inter maĉoj. Li rakontis kuriozajn epizodojn pri la libroservo, i.a. pri itala kamparano, kiu ĉiun duan semajnon telefone mendas librojn (kaj eĉ petas lian helpon pri malfacilaj frazoj renkontitaj dumlege k.s.), ŝoke kontraste kun certaj ‘eminentuloj’, kiuj tutan jaron eĉ unu libron ne aĉetas...

Dum sia amuza rakontado Ionel ankoraŭ trovis tempon venigi kelneron kaj plendi pro nesufiĉa saleco de sia plado, kio mirigis kaj embarasis la restoracianon. Tiu ĉi petis mil kaj unu pardonojn kaj tuj iris serĉi kaj liveris al li salujon, kiun Ionel akceptis kun komprenema kaj afabla rideto.

Baldaŭ s-ro Syôzi montris kaj poste enmanigis al mi kajereton, en kiu li i.a. notas kaj kolektas esperantajn nomojn kaj esprimojn pri stulteco kaj frenezo, kaj kun sia petole ĉarma rideto apenaŭ rezistebla li petis min pliriĉigi la liston! Kun la helpo de Ionel, mi aldone enskribis jenajn: *ŝtipo, beoto, mankas klapo en lia kapo, muŝo zumas en lia kapo, lia cerbo iris promeni* (postkongrese mi retmesaĝe alsendis du pliajn: *li ne bone tiktakas, en lia cerbo kreskas herbo*). Nu, temis entute pri neforgesebla vespero, kiu elglitis tro rapide!

Ĉe la fino, plia surprizo. La kelnero, por kompensi la nesufiĉan salecon de lia plado, alportis al Ionel tranĉaĵon da pudingo Abade de Priscos,²⁶ eble la plej dolĉa kaj kolesterolabunda frandaĵo en la tuta



Tranĉaĵo da pudingo Abade de Priscos.

²⁶ Manuel Joaquim Machado Rebelo (1834–1930), ordinare konata kiel Abade (“Abato”) de Priscos, estis portugala katolika abato kaj gastronomo, kiu dum 47 jaroj oficis en Priscos, eta distrikto en la municipo Brago, en la nordo de Portugalio. Li aŭtoris multajn receptojn, i.a. tiun de la fama pudingo.

gastronomio portugala, enhavanta ja duonkilogramon da sukero, kvindek gramojn da lardo, karamelan tavolon, kalikon da portovino kaj — plej mirinde — dek kvin ovoflavojn! Imagu do, kara leganto, la mienon de la kelnero, kiam Ionel, kun afable kompatema rideto, konfesis, ke li estas... diabetulo! Tamen la frandaĵo restis sur la tablo, inter ridetoj kaj eĉ ridegoj, kaj poste Ionel, dum li babilis, poiome, per etaj sed ripetaj kulerplenoj, preskaŭ timide, kvazaŭ li volus konvinki sin mem, ke li enbuŝigas sufiĉe salubran nutraĵon, manĝis preskaŭ la tutan pudingon! Ni ĉiuj ridegis! Kia neforgesebla vespero!

Ĵaŭdon, la 2an de aŭgusto, renkontinte min en la libroservo, kiun li kaj mi ofte kaj elpoŝige vizitis, kaj informinte min, ke li mendis 13 ekzemplerojn de miaj verkoj, s-ro Syôzi denove invitis min vespermanĝi, ĉi-foje en suŝiejo. Je la 19a horo mi renkontis kvin geĵapanojn kaj unu ĉinon en ilia hotelo Fénix Urban, sur avenuo António Augusto de Aguiar, kaj de tie ni sesope piediris al restoracio Up to Sushi, sur la sepa etaĝo de hotelo America Diamonds, sur strato Tomás Ribeiro. S-ro Syôzi marŝis rapide kaj vikle, kvazaŭ li pli junus ol mi, sed lia edzino ofte postrestis, apenaŭ kapabla kunambli. Krome, li senpene kaj senhezite orientiĝis surstrate, kvankam li neniam vizitis Lisbonon aŭ Portugalion antaŭ la kongreso.

En la restoracio li instruis al mi la arton teni kaj manumi haŝiojn. Montrinte la ĝustan pozicion de la fingroj, li instigis min haŝii la viŝtukon, kiu kuŝis antaŭ mi. “Tiel oni ordinare provas”, li klarigis. Kvankam plumpe, mi sukcesis levi la blankaĵon kaj tiel entuziasmiĝis, ke tuj poste mi provis haŝie detabligi ankaŭ skribilon kaj eĉ teleron, ĝis japanino tuj dekstre sidanta min avertis, ke tia cirkaĵo ne estas “bontona”...

Tuj maldekstre sidis la ĉino, “kies nomon mi ne volas memori”.²⁷ Jam antaŭe, en la hotela renkontiĝejo, mi ekbabilis kun li, dum ni atendis la ceterajn gastojn. Li lingvis flue kaj senĝene kaj klare prononcis, kontraste kun lia samlandano Trezoro, se ne paroli pri alia ĉino, kiu, lundon, la 30an de julio, fine de “kleriga prezentado pri Japanio” fare de Hori Jasuo (堀 泰雄) — tre verva preleganto! —, venis al mi kaj, post apenaŭ komprenebla balbuto, ridete transdonis al mi sian vizitkarton, sur kiu videblis, krom lia nomo, ankaŭ lia portreto, lia kvalifiko

²⁷ Esprimo trovebla en la komenco de la unua ĉapitro de la unua parto de *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* (1605), majstroverko de la hispana verkisto Miguel de Cervantes (1547–1616), laŭ traduko de Diego (1977: 27): “En vilaĝo de La Mancha, kies nomon mi ne volas memori, antaŭ nelonge vivis hidalgo el tiuj kun lanco en rako, antikva ŝildo, osta ĉevalaĉo kaj rapida levrelo” (originale: *En un lugar de la Mancha, de cuyo nombre no quiero acordarme, no ha mucho tiempo que vivía un hidalgo de los de lanza en astillero, adarga antigua, rocín flaco y galgo corredor*). La sagaca leganto baldaŭ ekkomprenos, kial “mi ne volas memori” lian nomon...

(“alta inĝeniero”) kaj la nomo de lia entrepreno. Mi ĝentile demandis, “Kion produktas via entrepreno?”, kaj li ridetis nekomprene. Mi reformulis la demandon, “Kion produktas via kompanio?”, kaj li respondis “Jes!”. Nu, dialogo ne eblis, do mi ĝisis lin. Poste mi transturnis la karton kaj eklegis sur ĝia dorso detalan priskribon, kiun mi transskribas *ipsis verbis*.²⁸

Ak rilacia potimera akvimua farbo

LEAC por protekti akvan tralikon

AitniveLa en La modo, anti-envejecimiento, forta ligo

Sekureco kaj media protekto ne-toksa, akvo korodo

Struktura plifortikigo riparo. Identigo de tertremo damaĝo

Malnova konstruaĵo riparo malnova kiel

Tamen oni ne supozu, ke nur ‘orientaj’ kongresanoj ne scias orientiĝi pri aŭ en Esperanto. Ekzemple, dum enĉambraj aikido-ekzercoj, kiuj sekvis prian prelegon de Mireille Grosjean, iu kongresanino, ricevinte de ŝi tre facilan instrukcion pri farena movo, ne kapablis respondi alie, ol: “*no entiendo*”...²⁹

²⁸ *ipsis verbis*: latinaĵo signifanta “per la samaj vortoj”, ofte uzata kiam oni transskribas citaĵon, ŝanĝinte nenion, eĉ se ĝi enhavas erarojn.

²⁹ *no entiendo*: “mi ne komprenas” (en la hispana).

Nu, mi revenu al la suŝiejo kaj al mia interesa (kvankam ne tre parolema) samtablano ĉina. Li pridonacis min per ĉina kravato plena de verdaj floroj kaj bonaŭguraj drakoj orkoloraj sur fono malhelblua, kaj ankaŭ per skatoletoj kun 50 gramoj da “teo Zamenhof”, lanĉita en 2017, okaze de la unua centjariĝo de la forpaso de la aŭtoro de Esperanto. Interna bela libreto plurlingva klarigas, ke la teo estas “Subtenata de Familio Zamenhof” kaj “Produktita de Guangzhou-Haozhan Te-Kompanio kunlabore kun Pekina Esperanto-Asocio”. La libreto enhavas ankaŭ edifajn frazojn pri Esperanto kaj teo, fare de verdstelanoj el la tuta mondo, inter ili tiu ĉi, de Saed (irana esperantisto el Ŝanhajo): “Ĉe ni teo kaj Esperanto kunfluas sur lango”...

Unuafoje en mia vivo mi suŝiumis. Ĉiam antaŭe mi rifuzis tiajn invitojn de amikoj kaj konatoj, ĉar min naŭzis la ideo manĝi krudan fiŝon, sed ĉi-foje mi akceptis la defion kaj delectis min per bongustaj (aŭ *delicaj!*) fileoj tinusaj kaj salmaj. Al s-ro Syôzi ne plaĉis iuj detaloj de la ofertataj suŝiaĵoj, kiujn li epitetis “usonecaj” — ekzemple, inunda kaj redunda uzo de *Philadelphia*-fromaĝo kaj aldono de majoneza kovraĵo — do tiajn menuerojn ni simple ne mendis.

Dum la manĝo ni abunde kaj fekunde babilis pri fiŝoj, legomoj kaj kuirajoj. S-ro Syôzi ĉiam kunportas kajereton, en kiu li enskribas nomojn, japane kaj esperante, de ĉiaj fiŝoj kaj

aliaĵoj gravaj por la nipona gastronomio. En ĝi ne mankas eĉ *trakuruso*,³⁰ nomo de tre bongusta fiŝo, same populara en Portugalio kiel en Japanio,³¹ kie, laŭ Nakamura (1964: 180), “oni rostas ĝin kun salo” (do, same kiel ĉe ni) aŭ “bolkuiras kun sukero kaj sojo”.

Post vinoplena suŝiumo, sed ankoraŭ antaŭ la fino de la komuna manĝo, la mistera ĉino subite stariĝis, ekskuzis sin per alia rendevuo samvespera kaj senplie forpafis sin. Min — kaj ne nur min — surprizis tia peripetio, sed iu samtablano flustris tuj post lia vanuo: “Lin atendas ekstere kromvirino. La ĉina stato pagas la vojaĝkostojn ne nur de certaj ĉinoj, sed ankaŭ de iliaj



Salrostita trakuruso laŭ japana maniero, kun la haŝioj (supre), kaj laŭ portugala stilo, kun bolkuiritaj terpomoj (malsupre).



³⁰ Vorto mankanta en PIV, sed trovebla en pluraj presitaj vortaroj inter almenaŭ 1963 kaj 1988, inkluzive de la fama Nakamura (1964: 180) kaj ankaŭ rete en *Konversacia Vortaro Esperanta-Albana*, de Bardhyl Adem Selimi (n. 1945):

https://esperantoshqipria.weebly.com/uploads/1/8/8/6/18865724/ko_nversacia_vortaro.pdf

³¹ Portugale *carapau*, hispane *jurel*, katalune *sorell*, galege *xurelo*, (A horse mackerel, F *chinchard*, G *Bastardmakrele*, Po *ostrobok*, R ставрида). La japana specio (*Trachurus japonicus*) nomiĝas あじ (*aji*) en la Lando de la Naskiĝanta Suno.

kromvirinoj...”. Kaj tial la ĉino, “kies nomon mi ne volas memori”, mankas sur la historia foto, kiun ĉe la fino faris kelnero!



En la suŝiejo. Maldekstre de mi staras ges-roj Syôzi. La nomojn de la du ceteraj gejapanoj mi ne memoras.

La sekvan tagon, vendredon, la 3an de aŭgusto, s-ro Syôzi, renkontinte min denove en la libroservo, invitis min ree vespermanĝi en alia suŝiejo, ĉi-foje espereble “aŭtentika”, sen usonecaj ŝminkoj — en posta retmesaĝo li diros, ke la ĵaŭda restoracio estis “tipa usoneca stilo, kian ni trovas en Havajo, Sanfrancisko k.a.” —, sed bedaŭrinde tiuvespere mi

havis familian supeon ĉe miaj gepatroj, kaj mi deziris revidi miajn gefratojn kaj genevojn post unujara foresto. Kaj tiel finiĝis mia japanumado dumkongresa. Postkongrese mi recevis de s-ino Syôzi retmesaĝon, per kiu mi sciiĝis, ke vendredon ili agrable vespermanĝis en suŝiejo Go Juu (sur strato Marquês Sá da Bandeira), kie la ĉefkelnerino eĉ “parolas la japanan tre dece”.

5. La Solena Inaŭguro

Dimanĉon, la 29an de julio, okazis la t.n. Solena Inaŭguro en la granda amfiteatro de Coliseu dos Recreios. Kelkaj rimarkoj, ĉefe lingvaj. Iu pranepino de Zamenhof voĉlegis paroladeton, sufiĉe flue kaj belprononce. Nur malofte ŝi stumbletis (ekzemple, “unuj la *ajliaj*”), sed kiam ŝi devis voĉlegi la naskiĝjaron de sia praavo (1859), kia katastrofo! Oni bone dresis ŝin antaŭe, sed la datojn oni forgesis skribi plenlitere, anstataŭ nur cifere. Nur tre pene, hezite, balbute kaj stakate ŝi sukcesis elbuŝigi la daton, sed la samideanar’ ŝin tuj regalis per aplaŭdo komprenema...

Plej aberacie prononcis Trezoro (Huang Yinbao), UEA-estrarano, kaj mi ne kapablis kompreni pli ol 50% de la enhavo de lia voĉlegata paroladeto, dum kiu plurfoje sonis la vorto *Esperendo*. Poste, kiam mi — iom honte — komentis al du

spertuloj mian komprenon nur duonan, ili konfesis similan nekapablon propraorelan, kio evidente trankviligis min... Parenteze mi tamen devas konfesi, ke en posta aranĝo (de CDE, mardon, la 31an de julio), la sama Trezoro, ne surpodie sed inter la publiko, stariĝis por spontane komenti ies intervenon, kaj ĉi-foje mi komprenis ĉirkaŭ 95% de lia diraĵo (kvankam li plu insistis pri *Esperendo*). Nu, verŝajne temas ne tiom pri lia prononco, kiom pri lia nekapablo voĉlegi kompreneble... Dum la menciita CED-aranĝo, cetere, mi kun granda plezuro aŭskultis komenton de fluparola usonano, kies nomon mi bedaŭrinde ne memortenas sed kies absolute modela, tute senakĉenta (kaj senafekta) prononco ankoraŭ tintas en miaj oreloj. Lia ekzemplo do montras, ke eblas tute superi nacilingvaj idiosinkraziojn ankaŭ ĉi-kampe, kondiĉe ke oni ilin konscie kaj zorge kontraŭbatalas. Ankaŭ en Varsovio, okaze de mia unua UK, en 1987, mi konatiĝis kun fluparola usonano, kies modela prononco min absolute ravis.

Nu, ankoraŭ pri la solena inaŭguro mi menciis la paroladeton de la prezidantino de TEJO, Hoan Tran (Ĝojo). Sian iom akuzativ-avaran diraĵon ŝi elbuŝigis ne nur laŭtege, sed ankaŭ torente, eĉ mitrale, tiom galope, ke ŝia cerbo postiris la langon, kaj vokaloj forgesiĝis (“*ti* ĉi momento”, “*Esprantujo*”) aŭ konsonantiĝis (“*alja* mejloŝtono”, “*alja* rolo”). Feliĉe tion kontrastis la modela prononco de Otto Prytz,

kiu nelonge parolis nome de la Akademio. Plej longe — kiel kutime, laŭdire — oratoris Mark Fettes, per sia leĝera akĉento angla kaj iom patosa stilo, sed lian preskaŭ tutan intervenon tradormis japana oldulino dekstre de mi, dum apudaj ĉinoj volupte fingrumis siajn telefonojn, tute ignorante la parolanton. Kiam venis fino al lia latino, tondra aplaŭdo vekis la dormantinon, kiu tuj mem ekaplaŭdis entuziasme...

La fina litanio de kurtaj salutmesaĝoj fare de landaj reprezentantoj tede treniĝis, ĉar temis pri ĉirkaŭ 70 landoj, sed ne mankis ankaŭ interesaj aŭ eĉ amuzaj epizodoj. Ekzemple, la reprezentanto de Angolo, eldirinte sian nomon, aldonis “kaj mi deziras...”. Paŭzeto, kaj denove “kaj mi deziras...”, kaj tiel ripete, kvar- aŭ kvin-foje, ĝis li fine kapablis esprimi ian deziron, kiun la publiko apenaŭ aŭdis, pro la ĥora ridado kaj kompatema aplaŭdo. Fine, la reprezentanto de Portugalio, Miguel Faria de Bastos, anstataŭ liveri atendatan mesaĝeton laŭcirkonstancan, komencis digresii kaj longe-rokoke frazistis pri historia temaro, kvazaŭ li prelegus antaŭ ministroj kaj katedruloj, ĝis lin subite kaj kruele interrompis unufoje, kaj baldaŭ poste tute silentigis, mokfajfa kaj malvivua salvo el la parterero...

6. Iberumado

Mardon, la 31an de julio, mi finfine ĝuis la okazon trankvile babili kaj vespermanĝi kun la ibera grupo, al kiu tiam aliĝis ankaŭ Giridhar Rao kaj, jam ĉe la fino, István Ertl kun sia filo. La neoficiala ‘programero’, kiun mi ege ĝuis, okazis en kongresejapuda restoracio bonkvalita, ĉarmetosa kaj moderpreza. Kia emocia momento por mi, post tro longa fizika foresto en aranĝoj ĉi-specaj!

Pri la supeo aperis foto, farita de Víctor Solé, en la 6a (vendreda) numero³² de la kongresa kuriero, sub la titolo “Rekune la Ibera Skolo”. Preskaŭ egala foto, farita de Giri, kaj reproduktita ĉi-sube, aperis poste en la vikipedia paĝo³³ pri la ‘Ibera Skolo’.

Temas pri historia dokumento, se konsideri, ke sur ĝi ridetas kvin el la kunfondintoj de la Esperanta Respubliko³⁴ (de maldekstre, laŭhorloĝe):

³² https://uea.org/pdf/uk2018/UKKuriero_6.pdf

³³ https://eo.wikipedia.org/wiki/Ibera_skolo

³⁴ Ĉerca ‘institutio’ fondita en 2008. Pliaj informoj troveblaj ĉe:
<http://esperantarespubliko.blogspot.com/>



De maldekstre, laŭhorloĝe: Miguel Fernández, Abel Montagut, Antonio Valén, Ana Manero, Gonçalo Neves kaj Miguel Adúriz.

Ministro pri Tujaj Buraskoj kaj Sonoraj Soloj, Ministro pri Kanta Briĝo kaj Universe Famaj Arkeoj, Ministro pri Misvojtoj, Neurĝaj Aferoj kaj Sakrado Hispanlingva kaj Supera Veziro de la Esperanta Respubliko, Ministro pri Saŭdado kaj Senkorpa Mistero kaj Ministro pri Sferoj Dek, Liven 10 kaj Aliaj Pseŭdonomoj. Bedaŭrinde, retenate de aliaj farenaĵoj, mankas sur la foto, pro neĉeesto lisbona, du pliaj kunfondintoj: Ministro pri Seksaj, Eklipsaj kaj Eksteraj Rilatoj kun la Esperanta Civito kaj Ministro pri Jozefaj Potaĵoj kaj Sun-Okulvitroj. Kvankam eksterfote, ĉetable sidis pliaj ministroj, do temis entute pri pintkunsido sendube grava, kiun la

portugalaj gazetoj kaj ceteraj amas-komun-kikiloj skandale ignoris...

Giri surprizis min per tre sobra manĝo: li ja remburis sian digestujon per simpla tomata salato kaj unu pita sitelforma kazeo (kvankam mi mendis du por li). Ankaŭ okaze de la diversaj manĝoj kun la japana grupo mi rimarkis, ke azianoj ordinaraj manĝas malpli abunde ol sudeŭropanoj. Mi scivolos, ĉu temas pri diferenco nur kultura aŭ ankaŭ organisma, do genetika. Jen interesa temo por esploro kaj por eventuala eseo...

Dum la vespermanĝo mi sciigis, ke la jaŭda belarta festo estas kompromitita, pro manko de ebleco provludi kun teknikista asisto en la sama ejo, kie la ceremonio laŭprograme okazos. Tiam mi telefone kontaktis mian amikon José Martins, predizanton de PEA kaj de LKK, kiu tiam vespermanĝis kun Clay Magalhães en alia restoracio. Mi decidis iom montri la dentojn kaj blufis, ke la prezidanto kaj la sekretario de BK minacas demisii, se oni ne disponigos al ili ejon kaj teknikistan asiston por provludi. José Martins promesis, ke li parolos kun Clay kaj penos solvi la aferon. En la sekva tago mi ricevis poŝtelefonan mesaĝon, per kiu la duobla prezidanto certigis, ke la afero estas solvita...

7. La Belartaj Konkursoj

Ĝis la nuna UK mi ĉeestis nur du BK-ceremoniojn, nome en Valencio (1993) kaj en Berlino (1999). La tiamaj aranĝoj konsistis el nura paroladeto de la komisiona prezidanto, anonco de la nomo de ĉiu gajninto, alpodia alvoko de la koncernato aŭ de ties reprezentanto, enmanigo de ties diplomo kaj eventuala voĉlego de la premiita verko, se temis pri poemo.

Ĉi-jare la ceremonio estis tute alia. Temis pri varia arta spektaklo, en impona salono, kiu altiris ege pli da homoj ol kutime, kaj la premia anonco kaj diploma disdono fariĝis simpla ero de la tuta aranĝo, en kiu malpli reliefis la nomoj de la koncernaj individuoj kaj pli elstaris la esperanta kulturo mem, kiel fenomeno kultivinda kaj ĝuinda.

Jam de 1999 mi ne sendis konkursaĵojn por BK, kaj ankaŭ ĉi-jare mi longe hezitis, ĉu mi devas partopreni aŭ ne. Fine min decidigis diversaj persvadoj, kaj mi alsendis sep konkursaĵojn por kvar branĉoj kaj subbranĉoj. El tiuj ricevis unuan premion mia eseo *En la mondon venis parol' nova. Studo pri la parola uzo de Esperanto inter 1887 kaj 1905*.³⁵

Mi tre ĝojas, ke mi premiĝis ĝuste per tiu konkursaĵo, por kiu mi investis tiom da tempo kaj energio. Mi devis

³⁵ vd. la finan bibliografion (verko baldaŭ aperonta ankaŭ ĉe Eldonejo Drako).

konsulti 54 artikolojn kaj alispecajn referencverkojn por pluki la informojn kaj donitaĵojn, sed ilin tramplekti per kontinua, sencohava kaj leginda fadeno montriĝis tasko pli herkula, ol la esplorado mem, kaj venis momento, kiam mi emis rezigni, eĉ tial, ke samtempe mi devis fini kaj baldaŭ liveri tradukatan romanon, do mi staris rande de mensa elĉerpiĝo. Feliĉe mi kolektis fortojn mi-ne-scias-de-kie kaj alfinigis la eseon. Se konsideri mian tutan partoprenon, ĝi tamen rangas kiel la malplej sukcesa ĝis nun, se mi ne mismemoras, ĉar el sep verkoj nur unu ricevis premion. Ĉu tio signifas, ke jam ekis la degenero de Gonçalo Neves? Nu, espereble temas nur aŭ almenaŭ ĉefe pri tio, ke la nunaj ĵurianoj montriĝas pli rigoraj kaj pli postulemaj, kio salutindas, ĉar tia sinteno verŝajne stimulos la konkursontojn plialtigi sian nivelon, kaj do ankaŭ tiun de nia beletro ĝenerale.

Vokite surpodien, mi alparolis la publikon kaj diris, ke “la nomo de la aŭtoro ne tiom gravas; pli gravas la verko”. Poste mi klarigis pri kio ĝi temas kaj esprimis la deziron, ke ĉiuj aŭ almenaŭ granda parto de la aŭskultantoj povos koniĝi kun la eseo kaj ĝin tralegi, kvankam mi sciis kaj plu scias, ke tio plej verŝajne neniam okazos, ke la teksto ŝimos en venonta numero de *Belarta Rikolto* kaj rapide forgesiĝos, se mi ne faros ion por ĝin diskonigi kaj alirebligi al publiko pli vasta. En ĝi reliefas i.a. la rolo de Finnlando por la parola vivo de

Esperanto dum la frua tempo (pri kiu mi cetere apenaŭ sciis ion antaŭ mia esploro ĉi-verka). Eble mi povos kapti la okazon, ke la sekva UK okazos ĝuste en Suomio, por fari ion ĉi-cele.

Mi tre ĝojas, ke ĉi-jare premiĝis alia portugalo, nome José Crispim, nun tre maljuna, kiu povis mem surpodiĝi kaj ricevi sian diplomon, post honora mencio en 2012. Bedaŭrinde lin komplete ignoras Sutton (2008) kaj Minnaja/Silfer (2015), kvankam li atentinde verkas originale kaj traduke jam de longe, plejofte sub la pseŭdonimo Eduardo Novembro. Krome mi ĝojas, ke denove premiĝis la brazila verkisto kaj tradukisto Paulo Sérgio Viana, ankaŭ nejuste ignorata de la menciitaj



Staras sur la podio (de maldekstre) Paulo Sérgio Viana (Brazilo), Laure Patas d'Illiers (Francio) — kiu rekorde akaparis tri unuajn premiojn! — Miguel Adúriz, Ana Manero, Miguel Fernández kaj Gonçalo Neves.

historiografoj. Samkonkurse do ricevis premion tri malsamaj verkistoj portugallingvaj, kio starigas absolutan rekordon.

Nur ne plaĉis al mi, ke Sara Spanò, UEA-estraranino pri kulturo k.a., dum alia programero — nome, la Solena Fermo — laŭte anoncis, ke la esean premion Luigi Minnaja gajnis iu *Gonzalo Niebes*. En venonta kongreso, se mi renkontos ŝin en koridoro aŭ aliloke, mi verŝajne nomos ŝin *Sara Hispanò*...

8. La aŭkcio

Leginte tiom da favoraj opinioj pri la aŭkcia lerto de Humphrey Tonkin, kun granda scivolo mi unufoje ĉeestis tian aranĝon, kiu okazis vendredon, la 3an de aŭgusto, en salono Carreira. Nu, sian aŭkcian famon Tonkin certe meritas, ĉar li ĉion estris vigle kaj kompetente, sed samtempe tre sprite. Tamen mi rimarkis, almenaŭ dufoje, ke pro troa hasto aŭ miopeco aŭ alio li maltrafis levitan manon, kaj tiel perdiĝis plipropono, kiu povus ankoraŭ iom remburi la kason de UEA...

Tamen la evento estis ĝuinda ankaŭ psikologie. Unue, pro la enĉambra varmego apenaŭ eltenebla, la prezidantino de TEJO preskaŭ la tutan tempon staris flanke de Tonkin kaj per senĉesa ventumila svingado serveme refreŝigis la aeron ĉirkaŭ la aŭkciestra kapo. Kion diros niaj feministoj? Due, mirfrapas la kvanto da mono, kiun bonhavaj kongresanoj pretas elpoŝigi

por hamstri la plej nekredeblajn bagatelojn. Nu, dum ekzemplero de la *Fundamento de Esperanto* (de la naŭa eldono, bonege prizorgita de Albault en 1963) ricevis eĉ ne unu proponon, nomŝildo de Tonkin el la antaŭa usona Esperanto-kongreso, ŝapo kun portreto de Zamenhof kaj subskribo de Mark Fettes kaj ventumilo el la seula UK vendiĝis kontraŭ 6, 25 kaj 30 eŭroj, respektive... Alia kongresano ne hezitis elpoŝigi 25 eŭrojn por havigi al si ŝtonon de kastelo Greziljono... Kaj kion diri pri tio, ke la unua kongresnumero de la venonta UK vendiĝis kontraŭ 600 eŭroj?! Imagu kiom da pvz-volumoj oni povus aĉeti kontraŭ tiu sumo...

Pri aliaj aŭkcioj oni prave rajtus demandi, ĉu ili ne devus deponiĝi en muzeo, anstataŭ gliti en la manojn de privatulo, kiel ekzemple poŝtkarto de Marjorie Boulton el 2009 kaj fotilo de Detlev Blanke, kiuj vendiĝis kontraŭ 100 kaj 330 eŭroj, respektive...

Mi ŝokiĝis ankaŭ, ke la unua jarkolekto de *La Revuo* vendiĝis kontraŭ 60 eŭroj, dum la solan kaj ege pli raran kolekton de *Lingvo Kosmopolita* (1912–1913) iu akiris kontraŭ nur 25 eŭroj (do eĉ pli ĉipe ol alia la seulan ventumilon!).

9. La Esperantologia Konferenco

Pro la BK-spektaklo mi maltrafis la tutan matenan sesion de la Esperantologia Konferenco. Kiam mi posttagmeze envenis salonon Sacramento, Patience Haggin jam komencis prelegi pri la rilato inter la fama Dreyfus-afero kaj la Esperanto-movado, kaj miajn orelojn tuj agacis ŝia terura angla akĉento kaj ankaŭ ŝiaj konstantaj misakcentoj: *internacja opinjo, pŭbliko, léteroj, polítiko, ideologjo, antisémito, pozicjo* kaj tiel ade plu, dum la tuta prezento, cetere tre interesa kaj tre bone dokumentita.³⁶ Krome, ŝi konstante devis batali kontraŭ la horloĝo kaj tial vole-nevole trahastis gravajn punktojn. Tian saman nesufiĉon de prelega tempo sentis la sekva kontribuanto, Sabine Fiedler, kaj precipe mi mem, kiu sekvis ĉi lastan. Mi iom baraktis super mia *Power-Point*-aĵo kaj, kiam Orlando Raola, la kunordiganto, flustre avertis min pri tempopremo (“restas nur kvin minutoj!”), mi komencis haste transsalti prezentindaĵojn kaj pro nervostreĉo eĉ mia lingvonivelo

³⁶ Ŝia prelego venis al mi en la kapon, kiam, post kelkaj monatoj, mi legis jenan plendon de Katalin Kováts en *La Ondo de Esperanto* (2019: 1 (291), p. 14): “Kio pleje malĝojigis min tra la jaro, estis la malalta lingvonivelo de nia komunumo, manko de la prestiĝo de bona kaj bela lingvouzo. Vane ni ekzamenas la esperantistojn, fieras pri 2250 KER-diplomitoj, se dum gravaj tutmondaj aranĝoj, kiel ekzemple estis ankaŭ en UK en Lisbono, milo da esperantistoj devis aŭdi fuŝparolatan Esperanton de sur la podio”...

ekdegeneris (ekzemple, mi horore aŭdis el mia buŝo la pleonasmon *ekestigis*). Fine de mia prezento, eĉ mankis tempo por demandoj kaj respondoj pri mia temo (la Historia Vortaro de Esperanto), kion mi ege bedaŭris.

Unuafoje mi partoprenis la Esperantologian Konferencon, sed la ĝenerala koncepto ne plaĉis al mi, ĉar temas pri sinsekvo da prelegetoj — kvazaŭ industria ĉeno —, kiujn oni devas prezenti aŭ haste aŭ supraĵe. Ĉe la fino ial venis al mi en la kapon la vortumo “Malpli estintus pli”, titolo de la haŭpentala recenzo³⁷ pri la tonkina festlibro *La arto labori kune* (kiun iu maliculo alititolis *La arto trabori kundon*)...³⁸

³⁷ Legebla ĉe:

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8356&id=1211&recenzo=montru#ek>

³⁸ **kundo**: piĉo (virina vulvo). Slanga vorto (el la ĉeĥa *kunda*, kun apogo de L *cunnus* kaj A *cunt*), enkondukita de Piĉ (1981, 1988: 48) kaj pluuzita de pluraj aŭtoroj: Camacho (1997a: 79, 1997b: 110), Hauptenthal (2005: 4), Seabra (2009).

10. La surpriza festlibro...


Fine de januaro de 2018 retmesaĝe kontaktis min José Antonio Vergara, nome de trikapa redakta grupo, en kiu anis krom li ankaŭ du japanoj — Gotoo Hitosi kaj Kimura Goro Christoph —, kaj li invitis min partopreni per artikolo aŭ eseo en festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins, kiun oni intencis transdoni al la jubileulo okaze de la CDE-aranĝo dum la UK en Lisbono. Pro troa okupiteco mi rifuzis la inviton, sed fine de marto Vergara insistis kaj persvadis min, kaj fine de aprilo mi ja liveris al li 15-paĝan artikolon sub la titolo “Japanio kaj la latina”, jene resumitan:

“En la nuna artikolo mi analizos precipe la rilaton inter Japanio kaj la latina lingvo. En la unua ĉapitro mi parolos pri la historiaj rilatoj inter la japana kaj la latina kaj montros, ke ĉi lasta, same kiel la portugala, ludis gravan rolon por koniĝo de la japana inter eŭropaj kleruloj. En la dua ĉapitro mi prezentos la latinlingvan korespondadon, kiun mi havis kun japana profesoro inter julio kaj decembro de 1988, dum kiu ni pritraktis multe da temoj, i.a. ankaŭ Esperanton. En la tria kaj lasta ĉapitro mi skize mencios la agadon de aliaj nuntempaj japanaj latinistoj.”

La libron eldonis Mondial nur kelkajn tagojn antaŭ la UK, en 250 ekzempleroj, kaj Ulrich Becker sendis per UPS kvin “aŭtorajn” ekzemplerojn al Gotoo sub la adreso de hotelo Fénix Urban, kie ĉi tiu — kune kun japana grupo dudekkelkhoma — baldaŭ ekgastos, sed pro mistera ialo — supozeble tial, ke la nomo *Gotoo Hitosi* ne estis same ortografiita sur la pako kaj en la hotela gastolisto... — UPS malfruigis la liveron, kaj post vigla korespondado retmesaĝa inter Becker kaj la liveristo kaj inter mi kaj hotela responsulo la pako finfine trafis en la hotelan akceptejon matene de la 31a de julio, do ĝuste en la sama tago, kiam okazos, ĉirkaŭ tagmeze, la surpriza transdono al Lins.

Gotoo, jam en la kongresejo, ricevis prian sciigon de la hotelo, tien taksie hastis por preni la pakon kaj anhele revenis en la kongresejon por transdoni al la jubileulo, per tremaj manoj kaj ŝancela voĉo, fine de la programero de CED, la muŝkile³⁹ akuŝitan festlibron!

³⁹ **muŝkila**: malfacila; temas pri radiko arabdevena (مشكلة) — trovebla ankaŭ en aliaj lingvaj: hindia (मुश्किल), urdua (مشکل), bengala (মুশকিল), persa (مشکل), taĝika (мушкил), turkmena (*müçgil*), uzbeka (*mushkul*) —, enkondukita de Sadler (1967: 9, do longe antaŭ Lingwa de Planeta, kiu poste adoptis la saman radikon, sub la formo *mushkile!*), pluuzita de Camacho (2013a: 14) kaj Williams (2017) kaj menciita de Dasgupta (2018: 72). Temas pri vorto iom ‘ekzota’, ankoraŭ rara, sed certe preferinda al *difícila*, kiun lanĉis Hauptenthal (1984) kaj pluuzis Piĉ (1997).



Ulrich Lins (dekstre) montras la festlibron ĵus liveritan de Gotoo Hitosi.

11. Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj...

En retaj lingvaj diskutoj — ekzemple, en la fejsgrupa Lingva Konsultejo,⁴⁰ kiun mi frekventas — oni ofte ricevas la impreson, ke en Esperanto, malgraŭ ripetataj plendoj kaj veoj, ĝenerale ne *mankas* vortoj kaj esprimoj por ĉiutagaĵoj, male, tiaj vortoj kaj esprimoj eĉ *troas*, aŭ alidire, koncerne ĉiutagaĵojn Esperanto ofte montriĝas ne kiel idiomo unuece lernebla kaj senkonflikte instruebla sed kiel aro da idiolektoj aŭ grupolektoj, kiuj sin reciproke toleras aŭ puntilieme

⁴⁰ www.facebook.com/groups/konsultejo/

interdisputas. Tia “nesufiĉa fiksiĝinteco”⁴¹ de Esperanto bedaŭrinde sperteblas ankaŭ dum renkontiĝoj, kongresoj kaj similaj aranĝoj.

Jam en aprilo de 2018, okaze de internacia kolokvo pri Esperanto kaj Ido organizita de KCE en Ĉaŭdefono, mi rimarkis ekzemple, ke mi *prenas* trajnon, dum KCE-anoj ĝin *trafas*, kaj la homon, kiu en ĝi truas la biletojn, mi nomas *konduktoro*, dum ili prefere parolas pri *kontrolisto*. Ankoraŭ en Ĉaŭdefono, kiam mi liftis kun Claude Gacond en la Nacia Biblioteko, por viziti la ejon de CDELI, li tiun aparaton nomis *ascendilo*...

Ankaŭ en Lisbono mi havis similajn spertojn. Ekzemple, dum sia prelego pri parolarto (lundon, la 30an de julio) Tonkin nomis polvosuĉilon *suĉpurigilo*, kaj dum la jam menciita aŭkcio li trifoje nomis ventumilon *ventolilo*. Dum la sama programero li laŭdis la “ledan *spinon*”⁴² de aŭkciata kolekto de *La Revuo*, sed tiun libroparton multaj — malprave, laŭ mi — nomas *dorso*. Dum la menciita vespermanĝo en Café Lisboa, s-ro Syôzi donacis al mi japanlingvan poŝlibron pri plantoj, sed

⁴¹ Laŭ trafa esprimo de Ertl (2010: 151).

⁴² **spino** (nePIVa senco): libroparto kuniganta la frontkovrilon kun la dorskovrilo, ofte kun surprisita titolo, legebla kiam la libro staras aŭ kuŝas sur breto. Vorto ĉi-sence renkontebla i.a. ĉe Camacho (2008a: 9–11, 2016a: 67), Fettes (2010: 38), Ragnarsson (2013: 48), De Smedt (2013: 11) kaj Carol (2016: 139).

antaŭ ol enmanigi ĝin al mi, li elŝovis el ĝi fortikpaperan rektangulon kaj demandis min pri ties nomo; Ionel, kiu fakas pri libroj kaj libraĵoj, tuj respondis anstataŭ mi: “tio nomiĝas *paĝindikilo*”; nu, tian objekton mi ĉiam nomis *libromarko*, sed eble de nun mi adoptos la ‘ionelan’ vorton, kiu ŝajnas pli klara.

Dum la solena fermo (sabaton, la 4an de aŭgusto), Emílio Cid, UEA-estrarano, uzis la vorton *flugroboto*, sed Bertilo Wennergren, en postkongresa fejsbuka diskuto, asertinte, ke temas ne pri roboto, proponis la neologismon *droneo*, dum aliaj kundiskutantoj pledis por *senpilota flugmaŝino*, *flugumo* kaj eĉ *burdo*; por kompletigi la kolekton mi diru, ke en la koncerna vikipedia paĝo⁴³ sidas ankaŭ jenaj variantoj: *telestiraviadilo*, *senpilota aviadilo* kaj *spavo* (akronime el *SenPilota Avio*)...

Se paroli pri Emílio Cid, dum la solena malfermo, okaze de la salutmesaĝoj de landaj reprezentantoj, li anoncis la nomon de Giridhar Rao, reprezentanto de “*Hinda Unio*”, sed ĉi lasta salutis “nome de la *barataj* esperantistoj”. Eble tial akademiano Brian Moon, por plaĉi al ĉiuj, sciigis, dum la publika omaĝo al Marjorie Boulton, ke li iam “vojaĝis al Barato / Hinda Unio”. Se paroli pri landnomoj, tre malofte mi aŭdis uj-formojn dum la tuta kongreso, kvankam mi atendis ion alian, ĉar kelkajn monatojn antaŭe Bertilo atentigis en fejsbuka grupo, ke tiaj formoj lastatempe revigliĝis en parola uzo...

⁴³ https://eo.wikipedia.org/wiki/Senpilota_aviadilo

Dum la solena fermo la podion anservice surtrotis la etuloj el la Infana Kongreseto okazinta en Almado kaj la parterajn maturulojn dolĉvoĉe salutis, sed eĉ niajn flavbekulojn jam disigas lingvouzaj detaloj, ĉar unuj anoncis, ke ili venas *el* lando X, dum aliaj kriĉetis, ke ili venas *de* lando Y...

Se paroli pri la solena fermo, en sia adiaŭa parolado Mark Fettes diris “vi *dividas* tiujn valorojn”, sed tian uzon de *dividi* stampis anglismo Sabine Fiedler du tagojn pli frue en sia prelego dum la Esperantologia Konferenco, tiel montrante, ke ŝi ne konsultis la Historian Vortaron, per kiu ŝi ja sciigis sur p. 23, ke jam en 1888 Grabowski skribis “ŝi kore dividis la malĝojon de la malfeliĉa Praskovja Petrovna” en sia traduko *La neĝa blovado...*

Laste, sed ne balaste, mi menciuj, ke la duan ĉefan urbon ĉi-landan iuj nomis *Oporto*, aliaj *Porto*, kaj la tradician portugalan kanton iuj nomis *fado*, aliaj *faduo*, laŭ NPIV. Se paroli pri NPIV, iuj prave aŭ malprave ne sekvas ĝiajn rekomendojn: ekzemple, Hori Jasuo, fine de sia “kleriga prezentado pri Japanio”, parolis pri “maturiĝintaj *persimonoj*”, prave ignorante la strangajn *kakinokojn* tiuvortarajn...⁴⁴

⁴⁴ Pri la plant- kaj best-nomaj bizarajoj de NPIV vd. Camacho 2013b.

12. Finaj mikspotaj rimarkoj

La 103a Universala Kongreso de Esperanto estis evento bunta kaj spertoriĉa. Multaj faktoj kaj travivaĵoj restu tamen en la inkujo, ĉar la nuna raporto jam fariĝis tro longa. Tamen, antaŭ ol prezenti finan skizon pri miaj ĝeneralaj impresoj, mi ne povas ne rakonti ankoraŭ epizodon ne senan je siaspeca spico.

Vendredon, la 3an de aŭgusto, mi ĉeestis la kunsidon de Eldonejo Lorenz, kaj mi tre ŝatis: la tempo pasis tro rapide, malgraŭ la varmego enĉambra. Min impresis la alloga prelegmaniero (kaj ankaŭ la plaĉa voĉo, bela prononco, taŭga korpoteniĝo kaj bona lingvorego) de la dua preleginto, kies nomo ĝis tiam estis al mi nekonata. Sendube la plej bona oratoro, kiun mi aŭskultis dum la kongreso (kaj mi aŭskultis multajn).

Temas pri Elmir dos Santos Lima, brazila kuracisto, pri kiu mi diru ankoraŭ ion. En la ĉambro, kie okazis la kunsido, neelteneble varmegis (nur poste envenis teknikisto kaj ŝaltis la klimatizilon). Ni ĉiuj ŝvitis, iuj eĉ ŝvitegis. Tamen, kiam la unua preleginto (João Silva dos Santos) eksilentis kaj venis la parolvico de Elmir, ĉi tiu stariĝis kaj surprize eldiris, ke varmo kaj malvarmo estas aferoj precipe mensaj, kaj sian aserton li

ilustris per signifa gesto, nome li ambaŭmane ektenis la roversojn de sia jako kaj ilin leĝere ektiris, kvazaŭ li dirus, “jen, malgraŭ la varmego ĉi-tiea, mi tamen ne varmas kaj eĉ ne demetos mian jakon, ĉar preleganto devas surhavi jakon”. Kaj efektive sur lia frunto nenia ŝvitero perlis! “Jen persono vere speciala”, mi tuj ekpensis, kaj la prelegmaniero tion konfirmis.

Nu, mia ĝenerala impresio pri la lisbona UK estas pozitiva. Kelkajn bedaŭrojn mi reportis hejmen en la memora valizo: ekzemple, mi ne sufiĉe ofte kaj abunde kunis kun miaj iberaj kolegoj kaj amikoj, mi apenaŭ babilis kun Suso Moinhos, António Martins, Faria de Bastos k.a. (kiujn redaktaj kaj alispecaj deĵoraj devoj rabis de pli senĝena kongresumado), mi maltrafis interesajn programerojn kaj ankaŭ promesplenajn koncertojn, se ne paroli pri la futbala matĉo, kiun mi, malgraŭ miaj grizaj haroj, deziris partopreni, eĉ se nur dum pokaj minutoj, sed tion malhelpis mia dekstra ŝultro — aŭ *epolo*, se uzi hapakson el 1888...⁴⁵ —, kiu ‘frostiĝis’ antaŭ la kongreso. Krome, mi malbone orientiĝis pri la aŭtoraj duonhoraj kaj do maltrafis kelkajn, kiujn mi nepre volis ĉeesti, kvankam prosperis al mi ĝui tiun de Minnaja, dum kiu Michela Lipari, starante en la fundo de la improvizita ‘ĉambro’ — kiu fakte estis nura galerio super la libroservo —, komencis krei

⁴⁵ vd. Neves/Pabst 2018: 154.

“Bonvolu ne mensogi!!”, ĉiam pli stentore kaj minace, ĝis la duonhorulo ĉesis ŝajnigi neaŭdon kaj ŝin iom atentis...

Aliflanke mi ĝojas, ke ĉi-foje, kompare kun antaŭaj kongresoj kaj alispecaj aranĝoj, miajn okulojn agacis malpli da skurilaj⁴⁶ figuroj kaj groteskaj sintenoj, malpli da flirtaj flagoj kaj stelabundaj kostumoj...



⁴⁶ **skurila** (G *skuril*): ridinde aŭ fremdige aparta aŭ stranga. Vorto enkondukita de Sproeck (1968) kaj pluuzita de *IF* (1971), Minnaja (1996: 1172) kaj Künzli (s.d.: 15).

Indekso de personoj

- Adúriz, M.: 34, 38.
Ahlberg, P.: 18.
Albault, A.: 40.
An U.: 16
Arosev, G.: 13.
Auld, W.: 14.
Avillez, J.: 22.
Becker, U.: 44.
Blanke, D.: 40.
Boulton, M.: 14, 15, 40, 47.
Camacho, J.: 8, 13, 16–19, 42,
44, 46, 48.
Camões, L. de: 13.
Carol, L.: 46.
Catarina: 20.
Cervantes, Miguel: 25.
Chen: 16.
Cid, E.: 47.
Corsetti, R.: 14.
Crispim, J.: 38.
Dasgupta, P.: 44.
De Smedt, P.: 46.
Declerck, C.: 8.
Dickens, C.: 4.
Diego, F. de: 25.
Don Quijote: 25.
Dreyfus, A.: 41.
Elpin: 16–18.
Ertl I.: 33, 46.
Faria de Bastos, M.: 32, 50.
Fernández, M.: 34, 38.
Fettes, M.: 32, 40, 46, 48.
Fiedler, S.: 41, 48.
Gacond, C.: 46.
Gotoo I.: 21, 43–45.
Grabowski, A.: 48.
Gröning, B.: 11.
Grosjean, M.: 27.
Ĝojo: 31.
Haggin, P.: 41.
Haupenthal, R.: 42, 44.
Hoan T.: 31.
Hori J.: 25, 48.
Huang Y.: 30.
Jegorovas, P.: 21.
Jehezkel: 19.
Jeremia: 19.
Josuo: 19.
Kimura G. C.: 43.
Kitagawa, H.: 20, 21.
Kitagawa, I.: 20, 21.
Knoedt, L.: 13.
Kováts, K.: 41.
Künzli, A.: 51.
Lemaire, R.: 9.
Lins, U.: 21, 43, 45.
Lipari, M.: 50.
Lorenz, F. V.: 11, 49.
Löwenstein, A.: 14, 15, 17.
Lu X.: 16.

Lusin: 16.
 Maas, J.: 17.
 Machado Rebelo, M. J.: 23.
 Magalhães, C.: 35.
 Malañi: 19.
 Manero, A.: 34, 38.
 Martins, A.: 50.
 Martins, J.: 35.
 Minnaja, C.: 14, 38, 50, 51.
 Minnaja, L.: 39.
 Miyamoto M.: 18.
 Moinhos, S.: 50.
 Montagut, A.: 34.
 Moon, B.: 47.
 Nakamura, T.: 28, 30.
 Neves, G.: 2, 7, 9, 10, 21, 34,
 37, 38, 50.
 Novembro, E.: 38.
 Onet, I.: 8, 22–24, 47.
 Pabst, B.: 7, 50.
 Patas d’Illiers, L.: 38.
 Petrovna, P.: 48.
 Piç, K.: 42, 44.
 Porto Carreiro Neto, L.: 17.
 Postnikov, F.: 9.
 Prytz, O.: 31.
 Ragnarsson, B.: 46.
 Rao, G.: 33, 35, 47.
 Raola, O.: 41.
 Sacramento, W.: 41.
 Sadler, V.: 44.
 Saed: 27.
 Saldanha Carreira, J.: 39.
 Santos Lima, E. dos: 49.
 Santos, J. S. dos: 49.
 Seabra, M. de: 42.
 Sekelj, T.: 8.
 Selimi, B. A.: 28.
 Shi C.: 16.
 Silber, G.: 38.
 Solé, V.: 33.
 Spanò, S.: 39.
 Sproeck, A.: 51.
 Sutton, G.: 38.
 Syôzi K.: 18, 20–22, 29, 30.
 Syôzi N.: 18, 20–24, 27, 29, 46.
 Tonkin, H.: 14, 39, 40, 42, 46.
 Trezoro; 25, 30, 31.
 Valén, A.: 34.
 Vergara, J. A.: 43.
 Viana, P. S.: 38.
 Wennergren, B.: 47.
 Williams, R.: 12, 44.
 Zamenhof, L.L.: 4, 19, 27, 40.

Bibliografio

- Ahlberg, Per (1905): *Esperanto-Svensk Ordbok*. Stokholmo: Stockholms Esperantoförening. 162 p.
- Camacho, Jorge (1997a): “Pudenda leko”. En: Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek: *Ekstremoj*. Novelaro. Vieno: IEM. 207 p. [p. 77–79]
- Camacho, Jorge (1997b): “Deziro”. En: Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek: *Ekstremoj*. Novelaro. Vieno: IEM. 207 p. [p. 109–112]
- Camacho, Jorge (1997c): “Gulivero en Ĉapelujo”. En: Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek: *Ekstremoj*. Novelaro. Vieno: IEM. 207 p. [p. 117–123]
- Camacho, Jorge (2008): Jorge Luis Borges: “Tlön, Uqbar, Orbis Tertius”. Tradukis Jorge Camacho. En: Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*. Elektitaj verkoj prozaj kaj poeziaj. Kaliningrado. Sezonoj. 200 p. [p. 8–19]
- Camacho, Jorge (2013a): *En la profundo*. Novjorko: Mondial. 319 p.
- Camacho, Jorge (2013b): “Vortoj en vortaroj”. *Beletra Almanako*, n-ro 18, oktobro, p. 65–71. Ankaŭ <http://jorgecice.blogspot.com/2013/09/vortoj-en-vortaroj.html>
- Camacho, Jorge (2016a): *Strangaj spikoj*. Poemoj. Novjorko: Mondial. Serio Originala Literaturo. 249 p.
- Camacho, Jorge (2016b): “La vartisto de vortoj”. En: *Belarta rikolto 2016*. Novjorko: Mondial. 139 p. [p. 63–76]. Ankaŭ <http://esperanto.net/literaturo/bk/verk/vartistvort.htm>
- Carol, Luiza (2016): “Observi verdajn okulvitrojn per verdaj okulvitroj”. Komentoj pri ‘La mirinda sorĉisto de Oz’ de L. Frak Baum, traduko de H. R. Dreyer (Bero, Berkeley, 2000) kaj traduko de Donald Broadribb (Mondial, Novjorko, 2012). *Beletra Almanako*, n-ro 26, junio, p. 138–141.
- Dasgupta, Probal (2018): “Du problemoj en la sintakso de Esperanto”. En: Christer Kiselman, Renato Corsetti, Probal

- Dasgupta (red.): *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-Pech. 229 p. [p. 65–77]
- Declerck, Christian (2002): *Tarokoj kaj epokoj*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo. 655 p.
- De Smedt, Petro (2013): “Bildvortaro”. *Horizontaal* 45, n-ro 259, januari–februari. p. 11–13.
- Diego, Fernando de (1977): Miguel de Cervantes Saavedra: *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*. El la hispana tradukis Fernando de Diego. Zaragoza: Eldono “Fundación de Esperanto” (HEF). 820 p.
- Ertl István (2010): “Esperanto kaj Eŭropa Unio: ĉu miraĝo, ĉu perspektivo?”. En: Detlev Blanke; Ulrich Lins (red.): *La arto labori kune*. Festlibro por Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA. 901 p. [p. 147–155]
- Fettes, Mark (2010): “‘Mi kvazaŭ trovis min ĉeĥeĵme’. Biografia konversacio kun Humphrey Tonkin”. En: Detlev Blanke; Ulrich Lins (red.): *La arto labori kune*. Festlibro por Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA. 901 p. [p. 20–43]
- Hauptenthal, Reinhard (1984): Johann Wolfgang von Goethe: *La suferoj de la juna Werther*. Tradukis R. Hauptenthal. Heckendalheim: Berthold Faber. 92 p.
- Hauptenthal, Reinhard (2005): “In memoriam”. En: Arthur Schnitzler: *Songĝeskoj*. Trad. R. Hauptenthal. Saarbrücken: Edition Iltis. 123 p. [p. 4].
- IF (1971): “Lugarno — nia kongresurbo”. *Internacia Fervojisto*, 23^a jaro, n-ro 6, p. 83. <http://ifef.free.fr/bultenoj/IF%201971-6.pdf>
- Künzli, Andreas (s.d.): (recenzo pri Bertil Nilsson (Red.): “Homarane. Kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio”). En: *Recenzoj diversaj*. 81 p. [p. 14–18]. www.planlingvoj.ch/Recenzoj_diversaj.pdf
- Löwenstein, Anna (2009): “Poetoj detruas nian lingvon”. *Esperanto* 1229 (10), oktobro, p. 195. Ankaŭ http://dvd.ikso.net/revuo/Revuo_Esperanto/2009/10.pdf
- Minnaja, Carlo (1996): *Vocabolario Italiano-Esperanto*. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto. 1438 p.

- Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio (2015): *Historio de la Esperanta Literaturo*. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop. 748 p.
- Miyamoto Masao (1979): *Sarkasme kaj entuziasme*. La kritikanto. 151 p.
- Nakamura Teruo (1964): *Enciklopedieto Japana*. Osaka: Kosmo. 217 p.
- Neves, Gonçalo (2018a): “En la mondon venis parol’ nova. Studo pri la parola uzo de Esperanto inter 1887 kaj 1905”. En: *Belarta rikolto 2018*. Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Novjorko: Mondial 122 p. [p. 48–74]
- Neves, Gonçalo (2018b): “Esperanto kaj mi”. *La revuo orienta* 99, n-ro 11 (1158), p. 2.
- Neves, Gonçalo; Pabst, Bernhard (2018): *Historia vortaro de Esperanto*. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Volumo 12. Embres-et-Castelmaure: Monda Asembleo Socia (MES). 518 + 4 p.
- Piĉ, Karolo (1981): *La litomiŝla tombejo*. Romano. Saarbrücken: Iltis-eldonejo. 276 p.
- Piĉ, Karolo (1988): “Pri kavaliro kiu konfesariis sian doŝon”. En: *Speciale por Henri Vatré, 80-jara*. (Red. I. Haupenthal). Genève: Artur E. Iltis. 79 p. [p. 35–51].
- Piĉ, Karolo (1997): *Ordeno de verkistoj*. Romano. Saarbrücken: Iltis-eldonejo. 382 p.
- Porto Carreiro Neto, Luís (1972): *Mediuma Poemaro*. Pluraj aŭtoroj. Poemoj originale verkitaj en Esperanto, medieme skribitaj de Luís da Costa Porto Carreiro Neto. Aranĝis la poemojn kaj tradukis la antaŭparolon A. K. Afonso Costa. Rio-de-Janeiro: Federação Espírita Brasileira. 119 + 9 p.
Ankaŭ www.febnet.org.br/ba/file/livro%20em%20esperanto/MediumaPoemaro.pdf
- Ragnarsson, Baldur (2013): *Laŭ neplanitaj padoj*. Poemoj 2011–2012. Novjorko: Mondial. 103 p.
- Sadler, Victor (1967): *Memkritiko*. Kopenhago: Koko. 60 p.
- Seabra, Manuel de (2009): *Malamu vin, unu la alian*. Novjorko: Mondial. 223 p.

- Sekelj, Tibor (1983): *Elpafu la sagon. El la buŝa poezio de la mondo*. Roterdamo: UEA. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 18. 187 p.
- Shi Chengtai (2010): “Sur la spuro de Elpin”. En: Detlev Blanke; Ulrich Lins (red.): *La arto labori kune*. Festlibro por Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA. 901 p. [p. 503–506]. Ankaŭ www.elperno.cn/movado/shi%20chengtai.pdf
- Sproeck, Adolf (1968): *La skurila libro*. Kopenhago: Torben Kehlet. 96 p.
- Sutton, Geoffrey (2008): *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007*. Novjorko: Mondial 2008. 728 p.
- Williams, Russ (2017): *Poemo de la tago 2017-06-13*. www.ipernity.com/blog/goulo/4665744

La nuna verko naskiĝis kiel “persona kaj privata raporto”, kiun la aŭtoro destinis nur al “tre eta grupo da fidelaj amikoj”. Tamen, laŭ cirkonstancoj klarigitaj en la enkonduko, la aŭtoro poste decidis publikigi ĝin. Tial nun ĝi “plu estas persona, sed ne plu privata”...

En ĝi oni povos legi i.a. pri drolaj epizodoj okazintaj dum la 103a Universala Kongreso de Esperanto, kiu havis lokon de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2018 en la “eksa imperia urbo Lisbono”.

La verko tamen “celas ne moki, sed nur prezenti la pure homan flankon de ni ĉiuj, ĉu moŝtaj, ĉu ordinaraj”...

